Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 5-a de Julio 2021

(hibrida - ĉeesta kaj zoma kunveno)

Ĉeestantoj: fizike - Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Avigail Meŝulam, Amri Wandel.
Zome - Eran Juval-Vodevoz, Ŝlomo Ŝaĥar, Gabi Zeevi.

***Protokolo** de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj jam enretigita.*

1. Raportoj

a) **Jehoŝua**: ni salutas Avigail, nian novan estraraninon. Ŝi okupiĝos pri kontakto kun la membraro.
b) **Jehoŝua**: nia adreso en ***Israela Esperantisto*** enhavas ankoraŭ la malnovan poŝtkeston. Ĝi estas korektenda venontnumere!
c) **Amri**: 120 ekzempleroj de ***IE*** 171 estis dissenditaj al eksterlando, al la institucioj kaj la abonantoj. La poŝtaj elspezoj estis sufiĉe favoraj: anstataŭ ĉ. 700 – nur 560 NIS. Al la israelanoj kiuj ne ricevis dum la Landa Kunveno, li sendos, kiam Jehoŝua sendos la ĝisdatigojn por la adresoj.
ĉ) Al II-a VK de UEA registriĝis ĝis nun ĉ. 1500 homoj, inter ili 27 israelanoj.
d) **Amri** iniciatis novan kampanjon de UEA: unuafojaj membroj el ajna lando pagu nur 20 eŭrojn, por aliĝi kaj al la VK kaj al UEA. UEA akceptis!
e) **Amri**: Sapir, nia nova membrino, faris afiŝojn, grafikaĵojn, dezajnojn, – eventuale uzotaj de UEA.
f) Vendrede, la 2-an de Julio, Jehoŝua, Amri, Gila kaj Tali partoprenis la entombigon de nia forpasinta veterana amiko, ELI-membro, David-Dvir Dotan (Mager), en Beer-Ŝeva. Krom liaj isrelaj kuzoj venis el Nederlando lia kuzino, s-anino Judith Unger. Jehoŝua parolis nome de ELI kaj Amri diris personajn vortojn. Pro maltaŭgaj publiktrafikaj konektoj Jehoŝua devis tranokti en Tel-Avivo, li petas rericevi nur parton de siaj elspezoj, kiel estrarano en oficiala tasko: 249 siklojn. ***Unuanime akceptita***!
g) David-Dvir Dotan havu nekrologon en la revuo ***Esperanto*** kaj en ***IE*** – Jehoŝua verkos kaj prizorgos publikigon.

2. Israela Kongreso (Amri)

Post la transpago al la gastejo ***Bnej-Dan*** ili diris, ke okazis eraro kaj la kosto de la ĉambro por persono devas esti je 200 NIS pli alta ol ili skribis en la kontrakto. Post longa negocado inter la direktorino kaj Amri ni atingis kompromison: 10 ĉambroj je la prezo de 1,071 NIS, (nur 100 NIS pli alta ol en la erara kontrakto) kaj 10 aliaj – laŭ la pasintjara tarifo (1,360 NIS por ĉambro). Laŭ propono de Amri la kotizo por eksterlandanoj ne estu ŝanĝita, ĉar la sumo – 185 eŭroj, kovras la prezojn. Israelanoj devos pagi ĉ 200 NIS pli, ol en la erara kontrakto, sed ne pli ol planite antaŭ la korona jaro, entute 680 siklojn por unu persono en dulita ĉambro. La prezo inkludas du noktojn, du maten- kaj du vespermanĝojn. Ĝis la 8-a de Aŭgusto ĉiu devos pagi 50%-ojn (do, unu ĉambro – 680 NIS), **ne rericeveblaj**. Ĝis la 23-a de Septembro oni

2/…

devos pagi la duan duonon. Nur kaze de registaraj limigoj la gastejo repagos la tutan sumon. Pli detalajn informojn, specialajn partajn prezojn, datojn, ktp – Amri priskribos kaj sendos baldaŭ al la membraro. Ŝlomo sendu al Amri la konto-numeron de ELI por aldoni en la letero, ĉar ĉi-jare oni pagos al ELI.

3. Dratverejo (Amri k.a.)

a) La propono de la kompanio estis 1,400 NIS por la purigo. **Amri**: private kostus malpli. Ŝlomo telefonos al Avraham, la dom-komitatano, por trovi iun por malpli alta prezo, nepre kun fakturo. La kompanio havas intereson superi dek- mil-siklan elspezon, sed ni ***ne*** devas akcepti ĉion. Amri devontiĝas fari malgrandajn korektojn de la kalkado. **Jehoŝua, Gabi**: sufiĉas kalkado, kaj ne farbado de la tuto.

c) **Eran**: granda klimatizilo bezonas fortan elektran sistemon, kiu eble ne ekzistas en tiom malnova domo. Preferindas du pli malgrandaj, unu – je 1 ĉevalforto, kaj en la salono – eble 1-1.5 ĉf. **Amri** proponas unu grandan, moveblan – aliaj kontraŭas; fine oni akceptas la fiksajn. Eran kaj Amri esploros la prezojn. **Ŝlomo**: Lior malfermos la pordon por la instaligo. **Alia**j: krom Lior kaj Avraham – ankaŭ ni bezonas kopion de la ŝlosilo al la loĝejo.

ĉ) Resumo de la farendaĵoj: unue – Ŝlomo postulos de la evikciantoj, ke ili forigu la restintajn aĵojn de la luantoj; se ne – ni devos prizorgi ĉi tion Krome li parolos kun la kompanio ***Milgam***. Laŭeble li vizitos la loĝejon por decidi, kio restu kaj kio ne. Ĉu necesas nova neceseja kuvo? Ĉu la lavmaŝino funkcias? Due: riparo kaj kalkado (ĉu Amri?). Trie: serĉo de purigisto kaj purigado.

4. Oficejo (Amri)

La kontraŭa flanko ankoraŭ ne plenumis ĉiujn siajn promesojn, ne liveris ĉiujn dokumentojn. Amri memorigis la ŝuldon al nia advokato, kaj avertis: se ili tiros tro, ni serĉos novajn, aliajn solvojn. Jehoŝua: la subita forpaso de David memorigas nin pri la sorto de niaj libroj – estas grave trovi magazenon!

5. Somerfina renkontiĝo (Jehoŝua)

Ĝi okazos la 30-an de Aŭgusto, je la 18h00, en ***Alter Nativ***, Dubnov-str. 10, Tel-Aviv.

La venonta kunsido: la 13-an de Septembro 2021, je la 20h00.

Protokolis: *Gabi Zeevi*; aldonoj kaj korektoj de *Amri Wandel*